


63-a jaro n-ro 178 2022:6

la lampiro

Leonora
Carrington



Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO
MIA AMIKO**



pma.esperanto.org.br

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Espere kaj labore
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Sidejo remalfermita
- 6 | **Recenzo**
La Mortinta Reĝino
- 8 | **Kino kaj aliaj artoj**
Leonora Carrington
- 10 | **Iom da Literaturo**
La supo
- 12 | **Opiniangulo**
Trejnado de la muskoloj
- 14 | **lingva angulo**
Legu, verku, demandu.
- 20 | **Popola saĝo**
Afrikaj aforismoj -2
- 22 | **Iom da poezio**
Parafrazeto
- 23 | **El la vivo de instruisto**
Nemezurebla surprizo
- 24 | **Virtuala fenestro**
Fratoj de La Lampiro
- 26 | **Por via medito**
Raroloj estas paroloj, nenio pli ol paroloj. Ĉu vere?
- 30 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj respondoj

La Turo (1955), karto-taroko kreita de Leonora Carrington.



63-a jaro n-ro 178 2022:6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima

Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf

Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues

Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2022

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Espere kaj labore

Jen alvenis la fino de unu plia jaro. Ne facila jaro, certe, por EASP kaj por la cetera mondo. Tamen malfacilaĵoj ofte proponas ankaŭ defiojn kaj progreson, se oni saĝe ilin alfrontas. Per interreto, la Esperantomovado trovis vojon tra la tempesto de la kronviroza pandemio, tiel ke malfermiĝis unikaj okazoj por evoluo.

EASP kreskis en la reto en maniero entuziasma: per legoklubo Gilbert Ledon, virtualaj Kulturkunsidoj, virtuala kafejo, dekoj da filmetoj en la Viva Gazeto en jutubo.

En novembro ni povis festi per bonega ĉeesta kongreso en la urbo

Ribeirão Preto, por ĉies ĝojo. Gratulon al la lokaj organizintoj! Ni plu vivas!

Ankaŭ La Lampiro digne travivis la jaron. Danke al manpleno da fidelaj kontribuantoj, ĝi aperis regule kaj proponis dignan materialon. Nia sinteno plu estis de politika kaj religia neŭtraleco, kaj niajn paĝojn povis legi kun supozebla plezuro ĉiu homo, kiu emas al kleriĝo kaj al pli larĝa maniero kompreni nian modernan mondon.

Ni esperas, ke sama laboremo nin antaŭenpuŝos dum la proksima jaro.

Koran dankon al vi ĉiuj, legemuloj kaj verkemuloj!

Paulo Sergio Viana



(Re)aniĝu por 2023!

Sidejo remalfermita

Saluton, karaj gelegantoj de La Lampiro!

Kun ĝojo mi skribas al vi kiel prezidanto de EASP. En ĉi tiu finiĝanta jaro, ni estas kontentaj pro la granda agado por Esperanto. Ni intense agadas en interreto, kaj mi petas, ke vi vizitu nian paĝaron. En jutubo ni havas diversajn programerojn, al kiuj ni same invitas vin.



Je la 17-a de decembro ni okazigis Zamenhofan Feston, en ĉeesta maniero: nia sidejo remalfermiĝis al vi! Ni havis nian kongreson en la urbo Ribeirão Preto, kie regis amikeco kaj korvarmo. La kongreso estis mirinda kaj plaĉis al la partoprenantoj.

La proksima brazila kongreso (fakte tutamerika) okazos en Fortaleza, Cearao. Dume, mi devas ekpensi pri nia proksima ŝtata kongreso. Ĉu vi proponas vian urbon kiel sidejon?

Koran dankon por via apogo al EASP.

Feliĉan Novjaron!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

<https://easp.org.br/asocio/#filiacao>



La Mortinta Reĝino

Titolo: “La Mortinta Reĝino”


Aŭtoro: Henry de Montherlant

Esperantigis: André Cherpillod

Eldonejo: Fonto, 2022 (dua eldono)

Ĉi tiu triakta dramo estis verkita en la jaro 1942, fare de la fekunda franca aŭtoro Henry de Montherlant (1896-1972). Estas sufiĉe kurioze, ke li decidis reverki la konatan epizodon en la portugala kortego, okazintan en la 14-a jarcento, kiam la princo Petro enamiĝis al la damo Ines de Castro, kontraŭ la deziro de sia patro, la reĝo. Post komplika intrigo, la reĝo ordonis, ke oni murdu la damon. Legendo aldoniĝis al la rakonto, ke Petro devigis la kortegon omaĝi la kadavron metitan sur tronon. La epizodo estas parto de la fama eposo “La Luzidoj”, de Luis de Kamoens, kiun oni konsideras la inaŭguro de la portugala lingvo.

Kial reveni al tiu rakonto, en la 20-a jarcento? La lerte kunmetita triakta teatraĵo ŝajne intencis diskuti flankajn aspektojn de tiu tragedio. Verŝajne, la



esenco de la tuta (nelonga) verko estas diskuti la homan etikon, kiam unu homo alprenas la rajton decidi pri la destino de alia homo. Densa dialogo pri tio estiĝas inter la konsilantoj kaj la reĝo Feranto, en la dua akto. La malicaj konsilantoj, motivitaj de politikaj interesoj, klopodas konvinki la reĝon, ke la murdo de Ines estas nepre necesa por la bono de la regno. La reĝo rezistas, ĉar li konsideras, ke la damo

estas tute senkulpa en la tuta afero. Liaj ĉirkaŭantoj tiam sugestas, ke li estus malforta, poltrona reĝo, se li kompatus la virinon, kies vivo nenion signifas. Feranto vee memoras la kristanan devon respekti la vivon. Montriĝas, ke la reĝo efektive estas plena de duboj pri sia destino, pri siaj agoj, pri sia sinteno kiel estro de popolo, pri sia propra valoro kiel homo. Eble la reĝo estas droninta en sensenca vivo sen moralaj principoj.

En la fino de la dramo, la Infantino, veninta el Navaro, al kiu Petro devus edziĝi, laŭ decido de la reĝo, surprize decidas savi la vivon de Ines, kaj vane invitas ĉi tiun fuĝi kun ŝi al Navaro. Neatendita grandanima sinteno de virino, kiun Petro estis ofende rifuzinta.

Temas do pri la malkohero de la homaj sintenoj. Estroj, kiuj estas malpli fortaj ol siaj subuloj; aŭtoritatuloj, kiuj valoras malpli ol siaj obeantoj; gvidantoj, kiuj mem bezonus gvidadon. Kion do signifas la sociaj leĝoj, bazitaj sur tiaspeca hierarkio?

Efektive, laŭ tiu aspekto, la temo estas eterna. Kiam aperos la revata “saĝa tirano”, ĉiam justa, prudenta kaj plene aŭtoritata? Kiam la homoj lernos, ke respekto al la individuo estas same grava kiel respekto al la socia strukturo?

Fine, mi elstarigu la elegantan tradukon de la verko al Esperanto, kiu faras la legadon malpeza kaj agrabla. Vere interesa, leginda teatraĵo.

(PSV)

easp.org.br/libroservo




Teksto:
Paulo S. Viana

Ilustraĵoj:
Anna Lobo

Leonora Carrington

Mi decidis nun verki pri brita artistino kiun malmultaj vere konas – Leonora Carrington. Mi mem ne konis ŝin antaŭ ol esplori iom pli por tiu ĉi artikolo. Mi ĝojas pro tio ke mi nun povas konigi al vi tiun ĉi interesan artistinon!



Leonora Carrington
(1917 - 2011)

Leonora naskiĝis je la 6a de aprilo 1917 en Lancashire, Britio. Ŝi estis ribelema kaj multe vojaĝis ĝis stabiliĝi en Meksiko, kie ŝi trapasis siajn lastajn 70 jarojn for de famo. Ŝiaj verkoj estas konsiderataj kiel iuj el la lastaj originaj superrealismaj artaĵoj kaj elstariĝas per pentraĵoj de abstraktaj mondoj.

Parizo gastigis ŝin dum tri jaroj, tempo dum kiu Leonora kunvivis inter aliaj modernistaj artistoj kiel Joan Miró, Salvador Dalí, Pablo Picasso kaj Max Ernst. Tiam, Max kaj Leonora iĝis koramikoj dum iom da tempo.

Mi ege ŝatas kion ŝi diris en intervjuo pri tiu epoko: “Ĝi estis grupo ĉefe el viroj, kiuj traktis virinojn kiel mu-

zojn. Tio estis humiliga. Pro tio, mi ne volas ke oni nomu min muzo de nenio, nek de iu ajn. Mi neniam taksis min virina-knabino, kiel André Breton volis vidi la virinojn. Mi neniam volis ke oni komprene min tiel, nek ankaŭ esti kiel la aliaj. Mi falis en superrealismon, ĉar jes. Mi neniam demandis ĉu mi povus eniri”.

En tiu epoko ankaŭ okazis la Dua Monda Milito. Tiam artistoj estis persekutataj. Ernst estis fine forkaptita al nazia kampo. Do, Leonora estis devigita fuĝi al Hispanio kaj poste al Portugalio, kie ŝi renkontiĝis kun meksika verkisto Renato Leduc, kun kiu ŝi poste translokiĝis al Meksiko. Ŝia rilato kun Renato daŭris nur pliajn du jarojn post tio.

En 1964 ŝi finis unu el ŝiaj plej rekonataj verkoj – la murpentraĵon nomatan “La magia mondo de la Majaĵoj”. Tiu verko estis kreita por arta konkurso de lernejo de la Nacia Muzeo de Antropologio kaj Historio de

Meksiko. Kaj por krei ĝin ŝi trapasis monatojn en sudo de Jukatano, studante la tradiciojn kaj religiojn de Majaa Kulturo.

Estas interese ankaŭ rimarki ŝian intereson pri sonĝoj kaj mistikaĵoj. Eventuale ŝi kreis pentraĵojn kiu poste kuniĝos en tre bela Taroka kartaro. Ŝia maniero vidi la mondon kaj ŝia emo instigi subkonscion influis ŝiajn pentraĵojn kaj forte montriĝas en ŝia arto.

Mi esperas ke vi ĝuis koni pri tiu artistino, tiom kiom mi ankaŭ ĝuis koni kaj verki pri ŝi! Ke tiu ĉi arta momento inspiru vin rekoni arton ĉirkaŭ vi! Ĝis la sekva fojo, artemuloj!

Anna Lobo de Carvalho



"Amo kiu movas la sunon kaj aliajn stelojn, pentrita de Leonora Carrington en 1946.



La Stelo, karto-taroko kreita de Leonora Carrington en 1955.

"La magia mondo de la Majaĵoj" murpentajo kreita de Leonora Carrington en 1964.



La supo

Malba Tahan

Kiam humila kaj ĝentila servisto verŝis la unuan kuleron da supo en la teletron de Lia Moŝta Reĝo, ronda grasa guto, neatendite saltante el la riĉa kaj artefarita konko, falis kaj makuletis la silkan manumon de la suvereno.



Julio Cesar de Mello e Souza.
(1895 - 1974)

Ruĝvange, kolere, stariĝis la reĝo Olderiko, frapante per fortegaj pugnoj la tablon:

— Infero! Mil bomboj! Vi ne scias servodoni supon!

Kaj, terurmiene, krie alvokante la gvardiestron, li ordonis:

— Pendumu tuj ĉi tiun maller-tulon!!!

La junulo, kiu restis en la mezo de la ĉambro, pala, senmova, aŭdinte tiun mortkondamnon pro sensignifa kaj ridinda misaĵo, ne sin retenis – li ĵetis la supujon sur la vizaĝon de la reĝo.

Tiu brutala ago kontraŭ la sankta persono de la reĝo kaŭzis nepriskribeblian miron. Nobeloj alkuris al la regnestro por helpi lin, kiu ŝancelpaŝis, premante per la manoj la vunditan frunton, dum la aŭtoro de tiu reĝatenca krimo estis mankatenata, kvazaŭ li estus sangavida kaj danĝera murdisto.

— Mi volas aŭdi tiun viron — kriegis la reĝo, dum kortega damo purigis lian vizaĝon kaj lian barbon per parfumita tualettuko.

La kriman serviston oni surgenuigis antaŭ la reĝo, kiu demandis:

— Kial vi faris tion?

— Mi volis morti kun pura konscienco, Sinjoro — respondis la malfeliĉulo. — Se mi estus pendumita pro la unua misaĵo, Via Reĝa Moŝto estus rigardata kiel kruela kaj maljusta reĝo. Oni dirus: “Reĝo Olderiko estas per-

versa. Li ordonis mortigi povran serviston pro guto da supo”. Nun ne. Post kiam mi ĵetis la supujon sur Vian Reĝan Moŝton, neniu rajtos akuzi mian suverenon pri maljusteco kaj perverseco. Kontraŭe – mia kondamno estas justa, pro la insulta krimo, kiun mi faris.

La reĝo agnoskis, ke la junulo pravas, kaj decidis pardoni lin. Kaj ekde tiam li punis la kulpulojn laŭ la graveco de iliaj eraroj.

Ankoraŭ hodiaŭ, en la glora lando de la reĝo Olderiko, kiam juĝisto juĝas

sen kriterio, eldirante sentencojn maljustajn kaj malĝustajn, uzante ekscesan severecon kontraŭ malriĉaj kaj sendefendaj homoj, oni tuj diras:

— Tiu juĝisto bezonas, ke oni ĵetu supujon sur lian vizaĝon!


*(Malta Tahan, pseŭdonimo de la brazila verkisto **Julio Cesar de Mello e Souza** (1895-1974) – Rakonto originale verkita en la portugala lingvo, esperan-tigita de **José Mauro Progiante**).*



Loja da EASP
Para quem ama ler livros

Categorias

▼ Digite para pesquisar e pressione enter



↻ Girar o livro

👁 Ver por dentro

Dom Casmurro

Machado de Assis

R\$35,00

13 em estoque

1

Comprar

f Facebook

t Twitter

p Pinterest

in LinkedIn

SKU: 100460

Categorias: Relacionado, Romance

Trejnado de la muskoloj

Nia Esperanta Movado similas al nia fizika korpo, kaj la esperantaj grupoj kaj individuaj esperantistoj similas al muskoloj kaj tendenoj de nia korpo.

Por fortigi la muskolojn de la korpo ni bezonas klopodi per senĉesa trejnado, dum jaroj, por atingi la idealan sanan kondiĉaron. Ne sufiĉas nur deziri, nepre ni devas klopodi dum longa trejnado, kun fokusa sintenado.

Sed, eĉ per peza trejnado la rezultoj ne aperos sen la necesaj nutraj suplementoj, ĉar niaj homaj korpoj, precipe post ioma aĝo, bezonas pli da akvo kaj ne produktas plu certajn hormonojn en la sufiĉa kvanto, nek faras sintezojn de certaj aminacidoj. Pro tio ni bezonas nutri la korpon per suplementoj kaj akvo kaj fortigi ĝin per trejnado por ne perdi nian vivokvaliton.

La saman rezonon ni povas surglui al nia Esperanta Movado, kiu ŝajnas malforta korpo. Ni, esperantistoj kaj esperantaj grupoj estas la muskoloj de

tiu ĉi malforta korpo, do, ni bezonas foriri el sofo kaj ekkomenci fortigi nin, ekzemple: per oftaj renkontiĝoj, per legogrupoj, per kursoj, per kreado de fakgrupoj en Rotary, Lyons, ktp.

Kiel nur la trejnadaj ne estas sufiĉaj por fortigi la korpon, ankaŭ en nia movado ne estas sufiĉaj la trejnadaj!

Estas necesa la suplemento de “financaj nutraĵoj”, ĉar niaj asocioj suferadas grandajn limojn en siaj agadoj pro manko de financaj rimedoj. Tiel, malmulton aŭ nenion ili povas fari pro manko de “financaj nutraĵoj”. La



konscio pri niaj kunaj eblecoj kre-as la forton de ĉiuj favore al sola celo: la efika uzado de Esperanto en la tuta mondo.

Fakte, se ni ne kredas je nia propra idealo kaj ne investas, monate, en ĝi, mem per sensignifa kvanto da mono, ni povas eliri de la Esperantista movado kaj aliĝi al ia ajn alia movado por fari tion kion ni amas. Vivi nian Esperantistan Movadon estas ami la lingvon, labori pro ĝia valoro kaj por ĝia venko! Tio estas fortigi la muskolojn kaj tendenojn de la Movada korpo de Esperanto. Sendube tiu estas laciga laborado, sed sen klopodoj kaj ŝvitado ni ne sukcesos venki la defiojn! Kion vi opinias pri tiu ĉi meditado? Kiuj estas viaj sugestoj por revigligi nian Esperantan movadon?



João Otávio Veiga Rodrigues



Legu, verku, demandu.

En la antaŭparolo al la libro *Gramatiko de Esperanto*, de la ĉeĥo Miroslav Malovec (Kava-Pech, 2a eldono, 2000), la iama prezidanto de Akademio de Esperanto, Geraldo Mattos (1931-2014) skribis, ke la verkon li legis “per akutaj okuloj, ĉar lingvon lingvano neniam mastras ĝis vere plena posedo, kaj nova instruero povas sin prezenti en artikolo de revuo kaj en ĉapitro de libro.” Nu, se ne ĝis “vere plena posedo”, almenaŭ do ĝis posedo “relative plena”, tio estas, ĝis la apero de “nova instruero”, laŭ la vortoj prof. Mattos.

La vortparo *plena posedo* neeviteble pensigas pri la verko *Paŝoj al Plena Posedo*, de William Auld. En la “antaŭklarigo” de la libro, la aŭtoro ne rekte konceptas tion, kion li nomas posedo *plena* – tiom malpli ia *relative plena*. Per *posedo* li celas *regon* de la



gramatiko kaj de certa kvanto da vortoj: “En la komenco mi supozas ĉe la studanto posedon de la gramatiko kaj elementan vortprovizon de ĉ. 700 vortoj”. Se *posedo de gramatiko kaj elementa vortprovizo* ne signifas *plenan posedon* de la lingvo, kion do signifas *plene posedi* ĝin laŭ W. Auld.

En la dirita “antaŭklarigo” li skribas plu, ke en la libro “la tekstoj estas aranĝitaj progresige, kaj ilia malfacileco estas ĝenerale gramatika aŭ stilistika.” Verŝajne posedo de la lingvo fariĝas *plena* post kiam lingvouzanto pers-pektive spertas nuancitan aplikon de jam akiritaj scioj – kio laŭ la starpunkto de G. Mattos estas afero kontinua, ne “vere” atingebla. Nu, indas demandi

pri tio, kion precize kapablas iu, kiu *regas la gramatikon kaj certan vortprovizon*.

Surbaze de la prezentitaj konceptoj, oni plej probable ne erarus per la aserto, ke lingvouzanto, kiu *regas la gramatikon* kapablas antaŭ ĉio – ne miru - skribi senerare. Laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER), li povus esti taksata kiel *memstara, sendependa lingvouzanto*, tio estas, reganta la lingvon je nivelo B2, kongrue kun la KER-memtaksilo. Estas grave emfazi, ke la Referenckadro dividas la kompetentojn je la kapabloj *ricevi* (aŭskulte kaj lege) kaj *produkti* (parole kaj skribe) en la lingvo. Ni legu kion tekstas la memtaksilo pri la B2-nivelo *produkti* en la lingvo (se konsideri, kiom da okazoj paroli kaj skribi donis kaj plu donas al Esperantistoj la nun mildiĝanta pandemio):

Parola produktado B2: Mi kapablas **klare** kaj kun **sufiĉaj detaloj** esprimi min pri pluraj temoj rilataj al mia intereskampo. Mi kapablas esprimi mian opinion pri aktuala temo, detalante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la diversaj ebloj. [Miaj grasigoj]

Skriba produktado B2: Mi kapablas verki **klarajn** kaj **detalajn** tekstojn pri **vasta gamo da temoj**, rilataj al mia intereskampo. Mi kapablas verki

eseon aŭ **raporton**, kiu peras informojn kaj listigas argumentojn kaj kontraŭargumentojn pri iu vidpunkto. Mi kapablas skribi leterojn, en kiuj mi emfazas kian gravecon mi donas al okazaĵoj kaj travivaĵoj. [Miaj grasigoj]

Kiom da Esperanto-parolantoj ĉirkaŭ vi *regas la lingvon* efektive je la ĵus priskribita nivelo? Konsterne malmultaj, mi respondus, precipe pro la fakto, ke sufiĉe multaj fariĝis Esperantistoj antaŭ longe (antaŭ jardekoj), movadumas, kongresumas kaj aktivas en forumoj, sed kiuj ankoraŭ ne fariĝis memstaraj lingvouzantoj, mirige ofte, skribe kaj parole, stumblas je gramatikeroj, kiujn ili unuavide devus posedi. En kio konsistas tiu stranga fenomeno, ke plurspecaj lingvospertoj apenaŭ influas la progresigon de tiom da aktivaj (kaj mi substrekas tiun vorton) veteranoj? Mi ne havas kaj eble neniam havos respondon. Per ĉi tiu artikolo mi ŝatus almenaŭ skizi, kiel oni povas finfine fariĝi *memstara* uzanto de la lingvo, *regi* ties gramatikon (laŭ la klarigoj donitaj antaŭe). Cetere, tiaj lingvo-stumblantoj ne konscias pri la propraj stumbloj. La sekvantaj proponoj, tute ne novismaj, helpos ĝuste en disvolvo de mempercepto.

(Tra)legu... gramatikojn!

Per regula kontakto kun la lingvo vi certe povos indukti la regulojn kaj finfine *ekposedi* ilin (ĝis la apero de “nova instruero”). Tamen, (tra)lego de gramatiko nediskuteble rapidigas la procezon. La dikan *Plenan Manlibron de Esperanta Gramatiko* vi certe ne tralegos en semajno, sed la *Detalan Gramatikon de Esperanto*, de la sama aŭtoro, jes. Eĉ pli maldika kaj plezure legebla estas la gramatiko menciita en la unua alineo de ĉi tiu artikolo. La tralego helpas vin ekkonscii pri gramatikeroj, kiujn vi ankoraŭ ne mastras, aŭ pri kiuj vi kredis, ke vi mastras.

Legu, legu... legu literaturon

Produktado en la lingvo estas konsekvenco de solida bazo, kiu fariĝas laŭ tio, kiel vi regule *ricevas* en la lingvo mem. Tute certe oni progresas produktante en la lingvo, sed ni estu konsekvencaj. La artikolo celas tiujn, kiuj ja produktas en la lingvo, sed kies produktaĵo estas ne tute senriproĉa. Ĉu utilas plu produktadi en la lingvo trafe-maltrafe sen ia strategio efektive

progresiga? Nu, pri tia strategio mi skribos poste.

Kian legaĵon elekti? Gusto gvidu vin. Kia literaturo *plaĉas* al vi? Feliĉe en

Esperantujo oni disponas pri ĉiuspecaj verkaĵoj. Elektu ion ajn, ĉu epopeon, romanon, gazeton... eĉ proverbaron. Mi povus malpraktike rekomendi “elektu legaĵon, kiu respondas al via lingvonivelo”, sed kiel scii, kiel decidi? Iom da kriterio povas helpi. La legado estu flua. Ne estu tro

da paŭzoj por cerbumado, pro nesciado de vortoj aŭ bezono relegi por kompreni.

Estus bone kalkuli pri aŭdvidaj materialoj, tiel abunde, kiel naci-lingve. Tiaj materialoj troveblas en Esperantujo kun tre varia kvalito. Radioelsendoj kaj sondokumentoj de voĉlegitaj periodaĵoj, kiel revuo *Esperanto*, estas facile troveblaj en interreto. Iel ajn, Esperantlingva literaturo abundas pluroble pli multe, bonŝance ankaŭ senpage, en interreto. Ni nur pensu pri Bitarkivo, Projekto Gutenberg, bitlibroj en la retejo de *La Ondo*, INKO, Librejo de Mondial kaj multaj aliaj. Guglu *literaturon en Esperanto*, kaj vi konstatos.



Korespondu (aŭ simple artikolu)

Eĉ se vi ne havas jam korespondanton. Rakonte skribu pri io, kio plaĉas al vi; tiel skribita letero restos ĉiam sendinda. Dum skribado vi ekkonscios pri tio, kion vi ankoraŭ ne kapablas taŭge esprimi, kaj pri tio, kiuj vortoj mankas al vi. Jen la okazo aktivigi akiritajn sciojn. Korespondanton serĉu dumtempe, sed... celkonscie serĉu iun pli spertan, kiu povos korekti vian leteron. Pri korekto rekte petu. Eĉ se li ne korektos ĉion, sed nur rimarkigos pri iuj punktoj, vi progresos.

Aŭ, tiom pli praktike kaj oportune, simple verku por Esperantaj periodaĵoj. Al ĉiuj ili mankas kontribuantoj, ĉu regulaj, ĉu sporadaj. Kolofone pluraj gazetoj avertas iel tiel, ke “senditaj kontribuaĵoj ne estos resenditaj”, kaj ke “al sendita letero la redakcio ne estas devigita reagi”. Ne gravas. Koncernas vin la sendo. Mi nur ne rekomendus dispafi vian tekston al pluraj redakcioj, aŭ almenaŭ informu, ke vi sendis la tekstojn ankaŭ al aliaj revuoj, ĉar multaj gazetoj akceptas nur tutnovajn tekstojn. Se unu akceptos vian tekston, decas tuj leteri al la aliaj, por sciigi, ke via teksto estas aperonta en la gazeto Ikso, ĉar ĉe represio ceteraj redakcioj devos mencii la premieran fonton.

Se kontribuantoj konsterne ofte mankas al gazetoj, kial mi sugestas, ke vian tekston oni povos ne akcepti? Nu, tial, ĉar malgraŭ la indeco de la enhavo, la malneteco de aliaj aspektoj – stilaj, gramatikaj – povos igi vian tekston entute neaperiginda. Dependas de tio, ĉu la redaktoro emos, aŭ havos tempon sarki vian tekston je ĉiuj malglataĵoj. Vi ne povos esti certa eĉ pri la apero de tutneta teksto, ĉar ties enhavo povas ne konveni al la gazeto. Ĉiuokaze, antaŭ ol forsendi vian verkaĵon, petu al aliulo provlegi ĝin. Gravas, ke se via teksto aperos, vi povos kompari la senditan kun la aperinta versio. Jen, laŭ mi, unu el la plej trafaj manieroj progresi en la lingvo, ĉar ĉiuj gajnas.


Kun la celo progresi pluen, mi rekomendus al vi aldonan taktikon. Post apero de via teksto, sendu ĝin (rekte, kuraĝe kaj neruĝiĝante) al aŭtoritataj Esperantistoj petante pri reago specife rilate la enhavon de la teksto (jes, mi sendos ĉi tiun tekston al iu tia aŭtoritatulo poste, kaj plurajn aliajn mi sendis pasintec). Memoru, ke "pri subskribitaj artikoloj respondas la subskribintoj mem" (ankaŭ ĉi tion vi legos ie en kolofono de gazeto). Tio signifas, ke la enhavon de via teksto redaktoro ne aparte priopinios.

Demandu (naive kaj stulte)

Mi ne troigas. Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, *naiv/a* signifas i.a. “sensperte malkaŝeman kaj kredeman, kiel infano”, kaj *stult/a* signifas i.a. “nespritan”. Temas do pri sinteno, procedo, konduto kaj, jes, celtrafa strategio. Kuraĝu.

En *La Fundamento de Esperanto* estas ekzercaro, eble vi scias. Ĝi konsistas el ekzemplofrazoj kaj unu fabelo. Mi jam tralegis la tutan *Fundamenton* kelkajn fojojn, ne nur la ekzercaron. Malgraŭ tio, unu (stulta kaj naiva) demando ĉiam tiklis min. Kie estas la ekzercoj en la ekzercaro? Iom lernejece mi demandis min, kion mi faru. “Mi ĵus finlegis ĝin, sed ne komprenas, kion mi devas fari.” “Post ĉirkaŭ dek kvin jaroj da Esperantisteco, ĉu mi demandu, kiel ekzerci min per senekzerca ekzercaro Zamenhofa?” Jen specimenaj demandoj, kiuj ekbolis en mi, antaŭ publika starigo de mia demando en fejsbuka grupo. Jes, mi timis ridindiĝi. Sed, kion fari? Mi deziras progresi!

Se vi bone komprenas, kion mi ĵus skribis, mi proponas eksperimenton.



Se vi legis mian artikolon ĝis tiu ĉi punkto, kontaktu min, kaj mi malkaŝos al vi tion, kion mi malkovris pri la ekzercaro danke al publika naiva kaj stulta demando. Sufiĉas retletero al mi (leandro.brazilo@gmail.com). Mi antaŭĝojas pri la kontakto!



En tiaj demandaj kaj petaj pilgrimoj vi multon rikoltos. Certe en via leterkesto restos kelkaj neresponditaj leteroj, sed ne gravas. En 1887 Zamenhof en seninterreta epoko eldonis 40-paĝan libron. Mi imagas, ke tiamaj Esperantistoj devis proporcie multe pli prave kaj ofte demandi, peti kaj sin reciproke helpadi. Nuntempe ekzistas plurspecaj eventoj, kelkaj virtualaj, aŭ parte virtualaj, dum kiuj oni povas spertiĝi kaj lerni: kursoj ĉe Jagelona

Universitato (Krakovo, Pollando), NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro), UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznano, Pollando), SES (Somera Esperanto-Studado), Arkones (Artaj Konfrontoj en Esperanto), Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pluraj aliaj. Tamen, ŝajnas al mi, ke *legado, verkado kaj demandado* restos plu validaj strategioj por ĉiuj Esperantistoj, kiuj deziras progresi en la lingvo kaj finfine *ekposedi* ĝin... ĝis la apero de nova instruero, starigo de nova demando kaj sendo de alia petletero. Kaj tiel plu.

Leandro Abrahão

leandro.brazilo@gmail.com



easp.org.br/libroservo

Afrikaj aforismoj - 2

*Saĝaj asertoj de afrika origino, rikoltitaj de **Hervée Tia** (Ebur-Bordo) en Quora kaj elfrancigitaj de **James R. Piton**.*

- ▶ Se vi rigardos vian filon, vi vidos liajn demandojn antaŭ ol ilin aŭskulti (proverbo de la sereroj, Senegalo).
- ▶ La kokinejo restos ora palaco por la koko, malgraŭ la fetoro de la loko (Ebur-bordo).
- ▶ Ne gravas kiom alte birdo flugas, ĝi fine alteriĝos.
- ▶ La fiŝo fidas akvon kaj en akvo ĝi kuirigās (Burkina Faso).
- ▶ Tempo estas fajlilo, kiu agas senbrue (Alĝerio).
- ▶ Oni aŭdas la bruegon de falantaj arboj, sed ne la murmuron de kreskanta arbaro (tuarega proverbo).
- ▶ Ne en la ĉaso-tago oni ekbredu hundon (Niĝero).
- ▶ Eĉ seka rivero konservas sian nomon.
- ▶ Kiu deziras la pluvon, tiu devas akcepti la inundon (Malavio).
- ▶ Per la akvo de la korpo oni ĉerpas tiun de la putoj (Niĝerio).
- ▶ La cindro, kiun oni kredas estingiĝinta estas tiu, kiu bruligas la domon.

- ▶ Multe vojaĝinta junulo estas pli aĝa ol maljunulo, kiu ĉiam restis en vilaĝo (Gabono).
- ▶ Plaĉaj vortoj eligas la serpenton el ties truo (svahila proverbo).
- ▶ Ĉiuj katoj fosas rubujojn. Sed nur la malprudentaj katoj enfalas (Senegalio).
- ▶ Kiu povas meti ovon en botelon, tiu ankaŭ povas ĝin demeti (Ĉado).
- ▶ Kiam oni dronas, oni tenas sin al ĉio, eĉ al serpento (Kamerunio).
- ▶ En ĉio necesas konsideri la finon (Alĝerio).
- ▶ Se vi eliras el la arbaro samtempe kiel la bubalo, sciigimpi arbon (Centrafrika Respubliko).
- ▶ La kalabaso de bonŝanculo ĉiam kreskas inter fiherboj (Kamerunio).
- ▶ Kiam poto rompiĝas sur via kapo, necesas uzi la okazon por lavi vin (Burkina Faso).
- ▶ Bovo ne vantas pri sia forto antaŭ elefanto.
- ▶ Kie estas la koro, tien ne hezitas iri la piedoj (Togolando).
- ▶ Ŝtono ĵetita kun boneco neniam estas reĵetita.
- ▶ Kiam vi donos kalsonon al via bopatrino, ne diru, ke tio estas por kovri ŝian postaĵon (Gvineo).

Parafrazeto

"La limoj de mia lingvo estas la limoj de mia mondo".

(Ludwig Wittgenstein)



Maria Nazaré Laroca

Tra densa mallumo brilegas la celo,
al kiu feliĉe ni iras
kun amo, kuraĝo, kaj granda fiero,
ne gravas mokoĵ ironiaj.

Ni iru la vojon celitan,
ĉiam semante senlace!
La kor' nin pelas al faroj:
senlima ja nia lingvo
limojn de l' mond' jam trapasas.

Maria Nazaré Laroca

Nemezurebla surprizo

BEJO, mallongigo de BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO, preparis, en la komenco de oka jardeko de la pasinta jarcento sian kongreson... La urbo Promissão, en la nordorienta regiono de ŝtato São Paulo, pere de la loka organiza komitato, planis elegantan kaj fruktodonan eventon... Ĝia ĉefa celo estis diskonigi amase la ekziston de nova propono por tutmonda lingvo ponto... Krom pluraj agoj, mi estis invitita kontribui instruante Esperanton en najbaraj urboj... Piraĵui?, Avanhandava?, Penapolis?, Araçatuba, ktp, kun granda partopreno de junaj studentoj/studentoj. Sed rimarkeblaj estis la kursoj en São José do Rio Preto, kies sekretariino pri kulturo ricevis la entreprenan proponon por instruado de nia kara lingvo kiel oportuna okazo por riĉigi la informadon de ĝia popolo... Tiom sukcesa estis la unua kurso tie efekvigita, ke la sekretariino, nome Dinorah do Vale, petis ke mi organizu novan kurson por pliiĝi la disvastigadon de tio, kion ŝi nomis “riĉega juvelo” de la homara kono... Denove nova grupo estas ari-

gita kaj denove centoj da lernantoj... Post la fino de la kurso oni organizis ceremonion por la livero de atestiloj pri partopreno al kursofinintoj... Komence mi salutis ĉiujn kaj dankis ilin... Poste, Profesoro Benedito Silva prelegis ,klarigante la celojn de la lingvo, la homaranismecan intencon de Zamenhof, kaj tiel plu... lernanto faris sian saluton kaj dankojn... Fine Profesorino Dinorah do Vale, patron(in)o de la kursoj laŭvice ekis sian prelegon al la ĉeestantaro... Jen la surprizo: en simpla kaj komprenebla Esperanto, surbaze de dudek lecionoj instruitaj en la kursoj, ŝi prelegis klare, mirinde! Mi eĉ ne povis kredi, sed la veron mi konstatis... Venis la koktelo kaj mi ne perdis la okazon denandi ŝin: “Profesorino, vi ne antaŭinformis al mi ke vi jam scipovas Esperanton...” Kaj ŝia respondo: “Fakte mi ne scipovis ĝin antaŭe... mi lernis kun vi. Kiel? Per aŭdado! En mia laborĉambro mi aŭdis viajn lecionojn el la klasĉambro kaj facile mi povis kompreni la lingvan enĝeniecon...”

(Daŭrigota sur la paĝo 29)

Fratoj de La Lampiro

Dum la lastaj jaroj aperis en Esperantujo tre interesa, atentoveka materialo, kiu konsiderinde riĉigas nian kulturon. Ili estas virtualaj, elektronikaj revuoj el plej diversaj mondo-partoj, kun varia materialo por plezura senpaga legado. Jen valora kontribuo, kiun interreto liveras al la uzantoj de la Internacia Lingvo. Tiuj revuoj, agrable ilustritaj kaj ĝenerale verkitaj en bona lingvo, konsistigas veran panoramon de nia kulturo, kiun povas senpage ĝui veteranoj, komencantoj kaj izolitaj homoj en foraj lokoj. Ilin produktas idealistoj, kies sola rekompenco estas la diskonigo de siaj pensoj, de siaj lokaj kutimoj, de sia kunhoma sento. Ĉi tie ni listigas kelkajn el tiuj belaj revuoj, kiujn indas viziti:

La Turka Stelo^[1]: monata publikaĵo de la turka Esperantistaro, elŝutebla en pluraj formatoj, kun tre varia enhavo. Enestas originalaj kaj tradukitaj artikoloj, poemoj, ludoj, informoj. Riĉe ilustrita.



Ora Ĵurnalo^[2]: publikaĵo de Esperanto-Societo de Gotenburgo, en Svedujo, apoge al la Esperanto-biblioteko en Satannum. Ĝi enhavas ĉiam kelkdek paĝojn da lokaj raportoj, kuriozaĵoj, beletraĵoj, opini-esprimoj, arto kaj Esperantorilataj tekstoj.

Penseo^[3]: monata beletra revueto eldonata en Ĉinio, enretigita ekde la jaro 1997. Premiita per Premio Grabowski 1994. Ĝi publikigas originalajn tekstojn en Esperanto kaj tradukojn el la ĉina lingvo: eseojn, prozaĵojn, novelojn, romanfragmentojn, recenzojn. La nuna ĉefredaktoro estas fervora ĉina Esperantisto Vejdo.

Nova Urbo^[4]: kelkpaĝa simpatia bulteno de la Internacia Fokolar-Movado — katolika movado fondita en 1943, fare de Chiara Lubich, nuntempe havanta anojn en multaj landoj. Ĝi prezentas ordinaraj belajn filozofiriĉajn tekstojn pri saĝo en la ĉiutaga vivo, pri la vivo en familio, kaj pri internaciaj eventoj. Agrable legebla ankaŭ por la ĝenerala publiko. Ĝia devizo estas “Unueco trans ĉiuj kulturoj”.

Komunikoj^[5]: bulteno de la brazila Eldona Societo F. W. Lorenz. La eldonantoj konsistigas spiritisman grupon, kiu tamen proponas spiritualismajn kaj etikajn tekstojn legeblajn ankaŭ por nespiritistoj.

Certe ekzistas aliaj similaj revuoj en interreto, kiujn ni ne menciis ĉi tie. Ĉu vi povas indiki al ni pliajn tiajn periodaĵojn, kara leganto?

Ni krome ne forgesu la interretajn riĉegajn publikaĵojn de UEA (<https://uea.org/revuoj>) kaj de sezonoj.ru (“La Ondo de Esperanto”). Ĉi tiu lasta proponas ĉiutage novajn informojn pri la Esperanta mondo. Ni ne forgesu: Esperantisto estas tiu, kiun nutras nia vasta verda kulturo!

(PSV)

[1] <https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuet/>

[2] <https://www.esperanto-gbg.org/eo/>

[3] <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

[4] <https://familiaro.com/>

[5] <https://www.editoralorenz.com.br/pagina/komunikoj.html>

Paroloj estas paroloj, nenio pli ol paroloj. Ĉu vere?

“La lingvo estas la ĉefa instrumento de komunikado kaj pensado”

Ivo Lapena – Retoriko”

La Esperanta renkontiĝo finfine okazis. La amikoj denove alvenis por kunvivadi, babili, trinki kaj manĝi en la esperanta klubo. Oni festis la datrevenan tagon de nia Esperanta klubo en Pasargado. Ĉu vi jam vizitis ĝin? Tiu bela urbo ne estis la urbo de la antikva Persio. Ne, tute ne! Ĝi estas en Brazilo, kaj se hazarde vi volas viziti ĝin, vi devas peti la adreson al S-ro Manoel Bandeira, la poeto kiu famigis tiun urbon pere de la poemo “Mi foriros al Pasargado”, en la jaro 1930.

Sed ne nur por babiladi ni alvenis al la klubo, sed ankaŭ por aŭdi paroladon de samideano Blanketo, psikanalizisto, kiu estis vizitanto de la klubo. La temo estis la graveco de la parolo en nia vivo, kaj kiel ĝi povas influi bone aŭ malbone nian kunvivadon. Mi ĉi tie volas transdoni kelkajn punktojn de la prelego, kiu multe impresis min.

La unua klarigo de la preleganto estas ke la vorto, multfoje, ne estas nur tio, kion la vortaro diras al ni. Oni devas atenti pri tio. Li ekzemplis la ideon per simpla rakonteto kiun mi resume prezentos al vi, karaj legantoj. “Du amikoj eliras de la laborejo, vendrede, la semajno finiĝis. Unu el ili, Antono, planis sabatan festeton por infanoj de la najbaroj siahejme, ĉar la filino datrevenis, jam 5-jara. La alia, Jozefo, pensis prilabori la teron, ĉar li havas terpecon kaj volas planti maizon tie.

La sabata mateno estis tre bela, varma, blua ĉielo kaj blankaj nuboj. Ĝis la deka horo Antono prilaboris la korton, tien li kunportis tablon, seĝojn, fiksis kolorajn flagetojn, ktp. Je la dek unua la infanoj alvenis, kaj komencis la feston. Jozefo, je tiu horo jam multe laboris kaj la grajnoj estis bone metitaj en la grundon.

Sed, je la dek unua kaj duono, la blovo alvenis, nuboj grizaj plenis ĉiele. Subite oni aŭdis tondrojn, kaj la pluvo

falis tuj. Ne imagebla surprizo. La infanoj kuris, rapide la korto esti tute malseka, la tablo, seĝoj... La festo finiĝis. Antono, kaj aliaj gepatroj estis tre malĝojaj. Samtempe, por Jozefo la pluvo estis vera beno, ĉar la grundo estos pli bona por la grenoj, kaj lia laboro certe havos grandan sukceson.

Kiam lunde, dum labora kunveno, iu demandis pri la sabata pluvo al ĉeestantaroj, bone... Antono montris vizaĝe la malĝojon, kaj grumblis pro la malbenata pluvo; sed Jozefo ekridetis plenplene feliĉa, kaj laŭte parolis: benata pluvo. Subite, ili sin rigardis, silente.”

Jes, pluvo, tiu simpla vorto, por ili ne plu estus nur akvo, gute teren defalanta de la densiĝintaj nubvaporoj. Ne, tute ne. La vortoj en iliaj mensoj havis alian signifon, plenplenan de forta emocio. Pro tio, la preleganto klarigis, kelkfoje amikeco rompiĝas, geedzaj kverelas kaj suferas, kaj multaj aliaj problemoj okazas en nia vivo, ĉar ni diras vortojn kaj ne perceptas ke ili okazigas doloron, suferon al alia homo. Ni ne devas nur paroli, oni urĝe devas lerni konversacii, kaj atenti rigardi la vizaĝon de nia kunparolanto, ĉar tuj post nia diro, la emocio speguliĝos tie. Vortojn, kiuj vundas oni devas tuj percepti, kaj halti kaj esplori la kialon, kaj kelkfoje peti pardono,

klarigante la veran sencon, kiun ni volas transdoni en tiu momento. La simpla rakonteto donas ekzemplon, kiel la parolo gravas kaj elvokas malsamajn emociojn en la menson de la personoj.

La preleganto raportis ankaŭ pri la psikologo Vigotisky kiu, siatempe, montris la fortan rilaton inter la penso kaj nia reala mondo. Post siaj studoj kaj esploroj, la psikologo konkludis, ke estas la parola penso kiu helpas nin organizi la realon en kiu ni vivas.

Por klarigi la ideon, la preleganto diris al junulo, kiu ĉeestas kun ni, la jenon: “Mia kara, venu ĉi tien kaj bonvolu preni tiun aĵeton kiu estas sur tiu aĵego”. Rapide la junulo stariĝis sed, tuj poste rigardis la preleganton kun mieno plena je duboj. La ĉeestantaroj ridadis. Jes, la frazo ne donas informojn sufiĉe klarajn, por ke li plenumu la peton. Tiuj “aĵoj kaj aĵetoj” havis signifon nur en la kapo de la parolando, nenion signifas en la kapo de la junulo, ne helpas al li ‘organizi la realon’ kaj plenumi la peton, – pri kio li parolas?, – li certe pensis, konfuzita.

Jen kiel gravas nia parolo, oni malmulte pensas pri la emocio, kiun ĝi elvokas kaj ni forgesas multfoje ke la signifo de niaj vortoj povas esti kaŝita ene de nia menso mem.

Fine, la tria aspekto de la parolo, kiun raportis al ni la preleganto, estis pri la parolo en nia interna mensa babilado. Jes, ni senĉese babiladas kun ni mem. Li do demandis pri la kvalito de tiuj vortoj. La menso, pere de tiaj paroloj, helpas la organizadon de nia rilato kun la ekstera realo. Jes, ĝi helpas aprobi aŭ konduki nian agadon, pri esprimado de niaj sentoj, ktp.

Sed, la parolanto reliefigis, bedaŭrinde, problemoj, kiuj okazis dum la vivo, eble dum la infaneco, kiam dolora kunvivado kun la zorgantoj (gepatroj aŭ ne) kreas mense iajn malverajn kredojn, kaj pro tio la interna babilado povas malhelpi tiujn personojn interrilati kun la realaĵo. Tiuj personoj malbone uzas la internan babiladon kaj pere de malmolaj paroloj ĉiam kritikis kaj ofendas sin mem. Li donis ekzemplojn, por klarigi tion, la personoj dirante al si mem: “Kial vi faris tiel, stultulo”, “Vi ne meritas fidon, idioto”, “Vi ĉiam malsukcesas, ĉar estas vera sensprita homo”, ktp...La infana tempo, kun troa disciplino, postuloj kaj kritikoj malmolaj, kreis internajn kredojn pri fiaskoj, kiuj malfortigas la animon, kaj interna parolo ripetadis tiajn malveraĵojn.

La problemo ĉi tie estas, ke la personoj ne plu fidis je si mem, kaj

kutime suferas pro mensa malekvilibro, kiel depresio, tiu mensa perturbo, karakterizata de grave deprima humoro. Timemaj, ekzemple, multfoje, tiaj personoj ne sukcesas doni taŭgan reagon en siaj profesiaj laboroj, kaj sentas sin nekapablaj venki la defiojn de la ĉiutaga vivo. Pro tio, Blanketo petis, ke ni atentu pri niaj internaj paroloj, kaj instigis nin uzi nur bonan vortojn, kiel: “mi ne frakasis, vere mi lernis ion plian”, “Mi ne perdis, mi gajnis spertojn por ne plu erari”, kaj multajn aliajn.

Diversajn aliajn punktojn la preleganto aldonis, je la fino, kiam li respondis niajn demandojn. Li ankaŭ parolis pri ni esperantistoj, kiam interparoladas kun samideanoj de aliaj landoj, kies malsamaj kulturoj, politika vivmaniero, religioj kaj propra socia karakterizaĵo, donas al ili mondan komprenon malsaman ol la nia. Jes, la paroloj gravas ĉi tie, ĉar povas okazi ke iuj vortoj ne havas la saman internan referencon, kiun ni kredas. Ĉi tie oni reliefigas la koncepton ke “lingvo estas socia fenomeno, kaj ne natura aŭ biologia aĵo” kiel klarigis Ivo Lapena ene de la leginda verko ‘Retoriko’.

Por fini, mi lasos por vi, karaj legantoj, pecon de la poemo de Cecilia Meireles, el la libro “Vojaĝo – 1939”. La

poemo nomiĝas “Kanto”. Jen eta parto – “Neniam mi volus diri parolon tiel frenezan: trafis la vento mian buŝon, kaj poste vian orelon. Ĝi prenis nur la vorton, postlasis la signifon. La signifo restis gardita survizaĝe, per kiu mi vin rigardas...”.

Jes, kara leganto, eĉ la neforgesebla brazila poetino Cecilia Meireles poezie instruas al ni ke, kelkfoje, nur la parolo ne sufiĉas por bona komunikado, kaj ni bezonas ion pli, rigardi la kunparolanton kaj kapti la veran signifon de la vortoj garditan sur la

vizaĝo, tio helpas multe. Ne kredu kiam la parolo diras jes kaj la vizaĝo mute krias: ne! Pripensu pri tio.

Mi volas paroli multe pli, sed mi kredas ke la plej gravaj punktoj de la prelego jam estas resume ĉi tie, kaj sufiĉas por instigi nin pensi pli serioze pri la elekto de niaj vortoj kiam ni interparolas, aŭ nur babiladas, kun niaj amikoj, profesie, aŭ kun niaj familianoj.

David Bianchini

davidesperantista@gmail.com



Daŭrigo de la paĝo 23 — (El la vivo de instruisto)

PS.: Dinorah do Vale: vi trovas ŝian biografieton en jutubo, kun pluraj opinioj pri ŝi, favoraj kaj malfavoraj, kio ĉiam okazas al kleraj homoj en politikaj postenoj... Ŝi verkis grandvalorajn pedagogiajn kritikojn al brazila sistemo pri edukado...

En la urbo S. J. do Rio Preto vi povas kontakti ONEI BORACINI ene de fejsbuko... Mi jam legis liajn amikkontaktojn kun pluraj eksterlandaj esperantistoj...

Valdemir Moreira

Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



Francisco S. Wechsler

Demando

Kiuj frazoj estas ĝustaj, kiuj malĝustaj? Kial?

Mi gajnis pecon da pano.

Mi gajnis pecon de pano.

Mi gajnis duonon da pano.

Mi gajnis duonon de pano.

Mi iris parton da vojo.

Mi iris parton de vojo.

Respondo

Laŭ Zamenhof (*La Revuo*, Junio 1907), la prepozicio da indikas kvanton aŭ mezuron da ia aĵo, sed ne indikas ĉi ties individuecon. Por esprimi la individuecon oni uzu la prepozicion de. Surbaze de tiu klarigo, ni povas aserti, ke peco da pano estas preskaŭ ĉiam la preferinda formo, ĉar ordinare temas pri la manĝaĵo pano (ia pano), ne pri unu difinita pano. La sama rezonado aplikeblas al *duono da / duono de* kaj al *parto da / parto de*.

Krome, en la sama respondo li avertas, ke *parto peco* ktp. havas la sencon de mezuro ofte, sed ne ĉiam.

Jen kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el la Zamenhofa verkaro:

[...] voku la katinon, ĝi ricevos **peco da** viando. (*Dua Libro*)

Dek ok jaroj estas granda **peco da** tempo. (*Paroladoj*)

[...] ŝi markis per **peco da kreto** sur la pordo grandan krucon. (*Fabeloj de Andersen*)

[...] ĝi ankaŭ prenis **pecon de** kredo kaj faris krucojn sur ĉiuj pordoj en la tuta urbo. (Fabeloj de Andersen)

Kiel **peco de** granato, viaj vangoj aspektas / Malantaŭ via vualo. (Malnova Testamento)

[...] tie ĉi estis elfosita tuta mortintaro **da** ostaĵoj kaj **da pecoj de** fenditaj kranioj. (La Batalo de l' Vivo)

En tiu ĉi tre interesa ekzemplo, la kvantesprima vorto estas *mortintaro*, t.e., temas pri neindividuigitaj objektoj, kaj tial Zamenhof uzis *da* por la ostaĵoj kaj por la pecoj; aliflanke, por *kranioj* la vorto *pecoj* striktadire esprimas ne kvanton sed specon, laŭ lia interpreto, kaj tial li uzis la prepozicion *de*.

Mi foriras, kaj mi revenos post **kvarono da** horo. (Dua Libro)

La tualeta tablo [...] kostis **duonon da** dolaro. (Fundamenta Krestomatio)

[...] jam post **kvarono da** horo da sinokupado je la arta lingvo [...] ĉiu skribos en ĝi diktaton tute senerare [...] (Esenco kaj Estonteco)

Ne pli ol **kvaronon da** horo li sidis [...] (La Revizoro)

Unu tago estas **tricent-sesdek-kvinono** aŭ **tricent-sesdek-sesono de** jaro. (Ekzercaro)

[...] ĉiu folieto de floro estis **duono de** perlo [...] (Fundamenta Krestomatio)

Pureco estas **duono de** vivo! (Fabeloj de Andersen 1)

[...] tiam li alportu kiel oferon pro sia peko **dekonon de** efo **da** delikata faruno [...] (Malnova Testamento)

[...] oni eble konsilos al ni transformi grandan **parton da** vortoj en nia lingvo [...] (Lingvaj Respondoj) (Temas pri kolekto de vortoj rigardata kiel unuo.)

La vivo de virino estas *patrineco*, krias **parto da** homoj. (Marta) (Simile)

Tie komprenas sin reciproke nur tre malgranda **parto da** kunvenintoj [...] (Paroladoj) (Simile)

En ĉiu transloĝiĝo estas **parto de** ruiniĝo. (Proverbaro)

Plia detalo: kiam ekzistas ia difinilo, kiel artikolo aŭ adjektivo rilatanta al la mezurata aĵo, oni normale uzas la prepozicion *de*.

<https://tekstaro.com/?s=6397a77a9322d>

<https://tekstaro.com/?s=6397a7b3504e1>

<https://tekstaro.com/?s=6397a7d1202d6>

<https://tekstaro.com/?s=6397a7e738a4f>

<https://tekstaro.com/?s=6397a7fe31478>

<https://tekstaro.com/?s=6397a814159fd>